

# LA PACDEFENDANTO

N-o. 54 NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ĈEĤOSLOVAKIO Junio 1956.

---

## AL TUTMONDA KUNLABORO

En la lasta jaro kaj en la nuna, grave ŝanĝiĝis la internaciaj rilatoj. Post la jaroj de "malvarma milito" iom moderiĝis la internacia tensio precipe en Eŭropo kaj en Ekstrema Oriento. Ĉi tiuj ŝanĝoj estiĝis kiel rezulto de profunda popola malkonsento kun la vetarmado, kun preparo de agresiva milito kontraŭ la nacioj en orienta Eŭropo kaj Azio.

En ĉi procedo ludis gravan rolon precipe la rezisto de ordinaraj homoj kontraŭ la danĝera ludo, kun la atom- kaj hidrogen-armilaro. Nun komencas eksterordinare validiĝi la kunlaboro inter la grandpotencoj sur la bazo de paca kunvivado.

La neceson de tiu ĉi kunlaboro trafe pravigis antaŭ nelongr la historio, la historio de glora koalicio de grandpotencoj kontraŭ la Hitler-faŝismo. La popoloj de Eŭropo neniam forgesos la tagon, kiam en frata ĉirkaŭpreno renkontiĝis la grandpotencaj armeanoj apud la rivero Elbe. Oni povas sen troigo diri, ke la rekomenco de tia kunlaboro inter la grandpotencoj, ludus nemezureble grandan rolon por la sekurigo de la paco.

La angla-sovjeta kaj la sovjeta-franca traktadoj de ĉefministroj atestas, ke la ideo de kunlaboro inter grandpotencoj fariĝas tre viva kaj forta.

Ŝatante la signifon de kunlaboro inter la grandpotencoj, ni tamen eĉ ne por momento povas malatenti la ĉefan principon, ke la internacia politiko ne plu formiĝas ĉe konferencoj, ĉar la formon ĝian kreas la popoloj. Estas eksterdube ke sen la longjara persista lukto ĉe la popoloj por forigi militojn, neniam oni estus povintaj atingi la hodiaŭajn pozitivajn rezultojn.

Jen por ni certe interesa konstato, kiun mi ĉerpis el la n-o 123 de la ĉeĥosl. revuo "OBRANA LIDU".

Otakar VYHNAL-

## ĈU EKSPERIMENTADO KUN ATOMBOMBOJ POVAS ESTI DANĜERA POR LA HOMARO?

Certe tiu ĉi demando multe okupas la pensojn de ĉiuj homoj. En nia lasta n-o ni publikigis artikolon de ĉeĥosl. kuracisto, majoro V. Řepka pri ebleco ŝirmi sin kontraŭ atombombatakoj. Ĉar nia redakcio ankoraŭ ne ricevis al ĝi diskutkorkontribuaĵojn, ni volas ĉi tie konfrontigi al tiu artikolo ankoraŭ raporton de la Ĉeĥoslovaka Presoficejo, publikigitan en "RUDÉ PRÁVO" la 26. de majo 56. RADTOAKTIVAJ FRUKTOJ KAJ LEGOMOJ EN JAPANIO

Tokio, la 4.5. /ĈTK/-- La 24. de majo, kvar tagojn post la amerika atom-eksperimento en la Pacifiko, eldonis la oficejo de la japana ministerio por socialaj prizorgoj en Osaka atentigon, ke la fruktoj kaj legomoj en meza Japanio estas forte radioaktivoj. Laŭ raportoj de REUTER-pres-agentejo, oni avertis la civitanojn kontraŭ uzado de tiuj fruktoj kaj legomoj, ĉar la kvanto da radioaktiveco en ili konstatita post la antaŭnelongaj grandaj pluvoj, estas kvinoble pli granda ol kapablas elteni sen endanĝerigo la homa organismo."

Certe multaj homoj jam konsumis la radioaktivajn fruktojn kaj legomojn antaŭ ol la oficialaj instancoj konstatis la danĝeron por la homa organismo.

Rudolf BURDA -

### LA HUNGARA MOVADO ENIRAS NOVAN EPOKON

Grave kontribuas al nia movado la regionaj kunvenoj. La 14. de aprilo la Esp-rondo de la Ŝtata Gimnazio en Vasvár, precipe ĝia direktoro Lányi kaj prof. d-ro. Jozef Kondor kun sia ĉarma edzino (germanino el Dresden) publikan pacvesperon en la loka kulturdomo, ĝin partoprenis ankaŭ 11 gek-doj el Budapesto, el kiuj Julio Baghy en ĉambrego plenigita de 300 personoj hungarlingve prelegis pri la naskiĝo de Esperanto kaj ĝia rolo, destinata al internacia amikiĝo kaj kukultura kaj porpaca interligo. Li demonstriis, ke Esperanto estas vivanta lingvo, kreita el naciaj lingvoj kaj vivpova pro ĝia abunda literaturo.

Menciinda estas la kulturprogramo prezentita de k-dino Kondor kaj de amator-ludantoj el la kulturhejmo, gimnazio kaj kolegio, montrinta la amikan rilaton inter la nacioj. Sur la scenejo estis, kiel kuliso, grandega televid-aparato, sur kiu la nomoj de stacioj, kiel Moskvo, Budapesto, Parizo, Vieno, Oslo, Berlino, Praha, Romo unu post la alia eklumigis, kvazaŭ la tieaj stacioj anoncus la prezenton de la televid-sceno per la hungaraj aŭskult-vidantoj. Kaj ĉiam aperis malantaŭ la travidebla ekrano de la aparato la ludantoj en konformaj kostumoj, prezentante sur la scenejo kantojn, dancojn, muzikon el la koncernaj landoj. Vere bonega ideo, kies sukceson pruvas tio, ke la sekvontan tagon jam sekretariino de junulara societo el knabina kolegio anoncis, ke la knabinoj ankaŭ deziras lerni Esperanton. Pri la vespero kaj la ekspozicio en la kulturdomo publikigis la partia ĵurnalo "VASMEGYE" detalan raporton de reprez. "MEM", k-do P. Balkányi. La sekvontan tagon okazis en la gimnazio laborkunsido de la Landa Esperantista Konsilantaro en kiu la ĉefsekr. k-do L. Márton detale konigis la staton de la movado, aprobitan de oficialaj instancoj.

Pli grava sukceso ankoraŭ estis Tutbudapesta Regiona Esperanto-tago, aranĝita la 13. de majo en vasta kaj moderna Ferlaborista Kultur-domo de la 20. distr. de Budapesto.

Post kanto de "La Espero" la prez. salutis la ĉeestantojn kaj konigis salutojn el 9 landoj kaj provincaj lokoj. La festkunvenon partoprenis 120 gek-doj. Gravaj estis la salutparoloj de sekretario de distrikta partia organize Keszthelyi kaj de la magistratestro Fűredi, kiuj rekonis, ke la movado troviĝas en bonaj manoj, havas bonajn celojn por helpi la kunlaboron de laborantaro en la mondo, la internaciajn kulturilatojn kaj plivastigon de la pacmovado. Ambaŭ promesis al ni oficialan subtenon.

Kiel reprez. de MEM salutis k-do P. Balkányi kaj en la nomo de UEA, ĝia

budapesta delegito L. Hattvár. En elokventa festparolado k-do J. Baghy komparis la movadon kun arbedo, kreskinta en la korto de lia loĝdomo inter ties muro kaj la muro de najbara domo, disiganta ilin. Tiel ni disigas la murojn inter la popoloj kaj de ni dependas ke la mondo vivu en paco, kion ĉiuj popoloj egale deziras. Menciinte la vortojn de Lenin pri la paca kunvivo, li alvokis, ke por la ĝustaj komunaj celoj ekagu. L.Márton parolis pri la ĝeneraleco de nia movado, en kiu ĉiuj tavoloj de la socio estas reprezentitaj.

Nun en Hungario jam estas 14 Esp-rondoj kaj funkcias 16 kursoj kun 400 gelernantoj. Ankoraŭ necesas plua serioza laboro kaj helpo, precipe necesas akiri la junularon.

Por junio ni preparas regionan kunvenon en la urbo Békéscsaba kaj la 18-20an de aŭgusto ni projektas aranĝi Landan Konferencon en Budapesto, al kiu ni ĝoje invitas ankaŭ niajn eksterlandajn amikojn. Nun ni pretigas ankaŭ "Migrantan Ekspozicion" kiel proponis gazeto "HEROLDO"- kaj eldonon de provizore hungarlingva bulteno.

Dumtempe fervojista rondo en Miskolc eldonis multobligitan informilon. En la sama urbo dum nacia packunveno parolis fakdelegito de UEA por pacmovado kaj fervojo, kdo I. Temesi, al kiu en sia findeklaro la prezidanto de la kunveno promesis sian helpon al la Esp-pacmovado.

Por pli gravigi nian agadon, ni bezonas interes. raportojn por nia gazetservo.

P. BALKÁNYI

Korespond. adreso: P. Balkányi, p.a. MAGYAR NEMZETI BANK, BUDAPEST-54

### ESTAS ĜUSTA, LERNI ESPERANTON?

Sub tiu ĉi titolo publikigis la centra organo de la Slovaka Komunista Partio "PRAVDA" en sia eldono de 15. majo longan dukolonan artikolon. Ĝi estas respondo al demandoj, kiujn starigis la sekr. de la Esp-rondeto ĉe la Kulturdomo en Bratislava al tiu ĉi redakcio. Ne eblas ĉi tie represi la tutan artikolon, ni nur povas diri, ke la respondo estas entute prava kaj favora al nia movado. Ĝi mencias la meritan agadon de esp-istoj por la paco k. absolute neas ĉiun ajn parencecon de Esp-o kun kosmopolitismo. La redakcio rekomendas studadon de Esperanto same kiel studadon de aliaj naciaj lingvoj, sed akcentas, ke Esperanto de si mem ne alportos pacon, se oni ne samtempe kun ĝi disvastigos paceman ideologion. Tiu ĉi artikolo fariĝis grava dokumento kontraŭ la kontraŭuloj de nia lingvo en la manoj de niaj slovakaj gekamaradoj. Ĝin subskribis por la redakcio. Jozef VARNARSKÝ.

### EL LETERO AL NIA REDAKTORO

Mi volas ĉi-kune esprimi elkoran dankon por via letero de 24.4. Ĝia enhavo, plena de estimindaj vortoj kaj sinoferema volo por la aferoj de paco, progreso kaj kulturo, jen kuraĝigis, jen kortuŝis min.

Ĝi kuraĝigis min tial ke vi sukcesis per energio, volo, kredo kaj entuziasmo starigi nian lingvan kaj movadon sur realan bazon. Tial estas granda honoro al vi, ke vi neniam sekvis tiun entuziasmon, kiun vialanda Antonín NOVOTNÝ (la unua sekretario de la kom.partio en ĈSR) kritikis per i.a. jenaj vortoj:

La personkulton paralizis la aktivecon de la amasoj. Partifunkciuloj estis edukitaj en la spirito de pasiva ĝisatendo. La komunistoj ĉesis pensi mem. La partio ne bezonas ne-pensantajn membrojn. La partio bezonas membrojn memstarajn, iniciativajn, pensantajn. La partio bezonas membrojn, kiuj estas orientitaj kaj kapablas tiri ĝustajn konkludojn kaj fari decidojn, membrojn, kiuj mem povas batali sub la plej malfacilaj cirkonstancoj ..."

Tiuj vortoj validas ankaŭ por ni, kiuj laboras sur la kultura kampo per la internacia lingvo!

Dum la oportunistoj-esperantistoj en la malfavora tempo por Esperanto sidis kun krucitaj manoj false meditante, ke pri Esperanto oni ne okupu sin, ĝi venkos de si mem, tiam vi tenis la torĉon flamanta kaj lumigis la vojon por nia lingvo en multaj landoj ...

... Ĵus mi finlegis la ĉeĥoslovakon eldonon de "PACO". Mi trovis en ĝi multajn legindajn kaj legendajn artikolojn kaj raportojn, kiujn necesas restudi, ĉar ili temas pri gravaj organizaj aferoj por nia movado. Cetere via gazeto estas tiel grava, ke neniuj leganto metu ĝin post la unua legado. Ĝi meritas relegadon kaj restudadon kaj la proponoj en ĝi vekitaj, efektivigon. Propraokule mi do povas vidi, ke vi faris Herkulan laboron kaj mi estas ankaŭ konvinkita, ke vi ne faris sizifan laboron. Ke la titolpaĝo estas laŭformate iom pli malgranda ol la ceteraj paĝoj, estas nur bagatelaĵo. Ĉefe estas, ke la preso estas bona kaj en tiu gazeto, kiun mi ricevis, ĉio estas bone legebla. Laŭ la enhavo ĝi okulfrape montras, ke nia movado disvastiĝas tra la mondo. Kaj tiel ĉefe pro via streĉa kaj altruisma laboro dum la jaroj.

Gösta HOLMKVIST-Malmö

Rim. de la red.:

Oni povus facile opinii, ke mi ankaŭ flegas personan kulton, sed, ĉar la en "la batalo ĉirkaŭ la laŭroj de merito" kelkaj esperantistoj ankaŭ atakas min, mi per tiu ĉi letero nur volas montri, ke multaj aliaj pensas aliel.

### DUM LA TEMPO DE HITLERREGADO

Dum la milito, en majo 1942, mi estis politika kaptito kaj ne ĉesis pro tio esperantistan kaj kontraŭfaŝisman propagandon.

En Chaeleroi (Belgio) arestita en kazerno, mi interkonatiĝis kun tiam gardestaranta germana soldato kaj tuj komencis propagandi apud li.

Li al mi konfesis, ke li neniel ŝatas la militistan uniformon kaj ege volus reiri hejmen. Estis tre danĝere por li, paroladi kun politika malliberulo.

Malgraŭ tio li restis mia amiko kaj diversmaniere klopodis dolĉigi mian malliberecon kaj tiun de aliaj kamaradoj el mia grupo. Ĉion li faris senpage, pro nura fido al mi. Kvankam malpermesite, li donis al mi sian nomon: Fritz JOBT, sian aĝon (laŭ mia kalkulo, li nun povas esti 50jara) kaj ankaŭ konfidis al mi, ke antaŭ la soldatiĝo li laboris ĉe Societo "UFA", filmproduktejo en Berlino.

Post kelka tempo li interkonsentis komune fuĝi el tiu ĉi stato: mi kiel malliberulo, li kiel devigita soldato de faŝismo. Li estis preskaŭ malliberulo kiel mi.

Brdaŭrinde oni suspektis lin kaj translokgis malproksimen al deĵoro. Nia grupo estis translokita al kastelo Huy kaj tiel nia projekto malebliĝis.

Jam de jaroj mi serĉas kontakton kun mia malnova brava amiko Fritz JOBT, sed vane. Ĉu iu el vi povas helpi al mi trovi lin, aŭ almenaŭ sciigi al mi ion pri lia sorto?

Antaŭdankon.

Profesoro Marc DELFORGE  
BOUILLON, Belgio

### POR PACO! POR FELIĈA ESTONTO!

Hela vivo! Feliĉan estonton! Sub tiu ĉi devizo ĉiu jare de 21-28 de marto laŭ la iniciato de la MEDJ (Monda Federacio de Dem. Junularo) kaj MSJ (Monda Studenta Asocio) oni festas la "Internacian Semajnon de Junularo". Ĝi signifas grandan feston. La Junularo ĝin festas kiel semajnon de batalo por la paco, nacia sendependeco kaj pli bela vivo. La junularo levas sian voĉon kontraŭ milito, rasismo kaj nacia subpremo, kontraŭ la reakciaj reĝimoj kaj militinstigantoj, sen diferenco de haŭtkoloro, religio aŭ lingvo.

La junularo batalas por la paco, ĉar nur en paco ĉiuj vivas feliĉe. Nur en paco eblas konstrui feliĉan estonton!

Por junaj geesperantistoj la "Internacia Junulara Semajno" estu ankaŭ granda festo! Ni junaj esperantistoj deziras pacon por la tuta mondo! Ni deziras, ke niaj geamikoj en ĉiuj landoj havu egalajn rajtojn, feliĉon kaj pacon! Vivu la Paco!

Marianne PANCHEVA  
28 Rue Filip Totyo, SOFIA, Bulg.

### ESPERANTO EN LATVA P.S.R.L.

La Esperanto-movado en Latvia F.S.R. nur komencas. Nia Esp-rondeto en la Pedagogia Instituto de Riga estas la dua oficiala Esperanto organizo fondita la 16an de aprilo. En la Pedagogia Instituto de urbo Lapajaestis fondita rondeto la 23. de februaro. Ni havas ankaŭ neoficialan organon por la respubliko – Riga Esp-iniciativa Grupo.

Estas malfacile fari propagandon por Esperanto, se oni ne havas oficialan Esp-gazeton. Granda sukceso en nia respubliko tamen estas la fakto, ke la gazeto "PADOM-JU JAUNATNE" (Soveta Junularo) promesis publikigi grandan artikolon por Esperanto la 7. aŭ 9an de majo. Apud ĝi aperas la foto de gaz. "PACO". Mi estas komisiita la artikolon verki.

La gazeto "P.J." promesis ankaŭ post tio daŭrigi publikadon de miaj artikoloj pri Esperanto. Al mi nun necesas prepari interesan materialon, rilate la Festivalon en Moskvo kaj aliajn interesajn aferojn.

Mi vin petas, skribu al mi interesajn leterojn pri aktualaj temoj. Viaj leteroj kaj ankaŭ poŝtkartoj (verŝajne bildoj), se vi permesos, estos publikigitaj en "P.J.". Tiel ni helpos propagandi Esp-on en Latvio.

Eble vi havas literaturon en Esperanto, kiu estus interesa por traduki en latvan lingvon. Niaj ĵurnaloj estas pretaj publikigi interesajn novelojn de viaj aŭtoroj. Precipe mankas infana materialo. Sed, ĉion, kio koncernos la Moskvon Festivalon, ili

publikigos certe. Rekompence mi povas al vi sendi ion laŭ via deziro.

Ervins MOZERTS  
Padomju bulvari 4-6, Riga, Latvio.  
Sovjet-Unio

### GRAVA ALVOKO EL LENINGRADO

Al ĉiuj lundaj aktivuloj estis sendita dum la lastaj tagoj alvoko de Kultura Ansamblo de la plej granda domo de kulturo en Leningrado, rilate la Festivalon de Junularo en 1957 en Moskvo.

Por Ĉeĥoslovakio ni eldonis aparte presitan flugfolion kun ĝia tradukita teksto en ĉeĥa lingvo kaj konciza klarigo pri la rolo kiun ludas jam Esperanto en la internacia pacmovado.

Tiun ĉi flugfolion kun la alvoko de Leningrado ni ĉi-kune sendas al ĉiuj niaj legantoj kun la deziro, ke ili ĝin plene eluzu por la propagando de nia movado.

Por akcenti la altan signifon de tiu ĉi flugfolio-pacarmilo ni lasu ĝin akompani de la trafaj vortoj de k-do prof.S.Podkaminer, la iniciatinto de nia movado en Leningrado mem:

"Se la Alvoko havos fortan reeĥon en la tuta mondo, la postsekvoj por nia movado, en Sovjetio kaj eksterlande, povas esti ekstreme gravaj; a/ Ni havos eblecon multon fari ĉe la festival-komitato: -presaĵojn Esp-lingvajn, Esp-paviljonon, divers. aranĝojn ktp. b/ tute eblas, ke responde al ĉi alvoko centoj k. eble eĉ miloj da junaj partoprenontoj de la festivalo studos Esperanton, kaj tiam la 6a Festivalo de Dem. Junularo povas fariĝi la turnpunkto en la tutmonda pacmovado - ni almilitos la junularon.

Necesas, ke tiu ĉi Alvoko havu maksimuman disvastiĝon inter la neesperantista junularo en ĉiuj landoj. Estus necese, ke ĝi estu tradukita en la naciajn lingvojn kaj publikigota en la plej granda nombro de diversaj gazetoj kaj ĵurnaloj. Ni mem intencas ĝin sendi ankoraŭ al kiel eble plej granda nombro da presorganoj. Tiurilate ni esperas, ricevi ankaŭ grandan helpon de niaj eksterlandaj gekamaradoj."

- - - -

La perspektivoj, kiujn al ni montras ĉi supre k-do prof. Podkaminer estas tre ĝustaj. Niaj gek-doĵ jam ne plu devos fari propagandon kun malplenaj manoj. Leningradanoj donis al ni grandan armilon en formo de ilia alvoko. Dependas nun unusole de ni ĉiuj, kiel ni kapablos ĝin sukcesplene eluzi.

Ke ne eblas kontraŭstari, evidentiĝas jam el la fakto, ke oficialaj instancoj ne povis rifuzi doni prespermeson por kelkmil da flugfolioj.

Tio signifas, ke la tuta teksto ĝia estas oficiale aprobita. La konsekvenco estas, ke ankaŭ la junular-organizoj, kaj ĝiaj funkciuloj amike starpunktos al tiuj proponoj. La flugfolio en ĉeĥa lingvo estas por vi grava dokumento, kvazaŭ "legitimacio" ebliganta al vi eniri la naciajn junular-organizojn, sed malgraŭ tio, estus granda eraro, se vi opinius, ke tiu flugfolio nun eklaboros anstataŭ vi. Ne estas tiel! Ĝi nur povas helpi al vi en via propagando kaj ĉe via elekventeco dependos, en kia grado ĝi sukcesos plenumi sian taskon.

Ĝi malfermas al via agado vastajn perspektivojn. Ĝian enhavon necesas importi en la junularon. Kun afablaj kaj amikaj vortoj vi devas konvinkigi individue

kaj amase la junularon pri la graveco de internacia lingvo por la Festivalo – 1957 en Moskvo. Certe, jam nun kiam vin niaj linioj atingas, la agado por tiu afero komenciĝis en diversaj landoj. Sekve ankaŭ vi proponu al la neesperantista junularo vian senprofitan kaj ofereman helpon. Organizajn grupojn eĉ individuojn kontaktigu kun sovjetaj kaj alilandaj. Fondu Esp-tradukrondojn, por peri tiujn kontaktojn! Aranĝu kursojn en la grupoj kaj instru Esp-on eĉ al unuopuloj. Se ni en ĉiuj landoj tiamaniere aktive eklaboros, estas tute reala afero, kiel diras k-do Podkaminer, ke la Festivalo fariĝos turnpunkto en nia movado. Nia devizo nun estu:

Nek unu junulo aŭ junulino vizitu la Festivalon sen antaŭa kono de internacia lingvo!

La ĉefa kaj uzota laborlingvo de la Festivalo devos fariĝi antaŭ ĉio – Esperanto!

La Festivalo de Demokrata Junularo – 1957 en Moskvo devas fariĝi la avantgardo en la batalo por uzado de internacia lingvo inter la ceteraj tutmondaj kaj internaciaj organizoj!

Ek al la laboro por la plena venko!

Rud. BURDA

### NOVAJ SUKCESOJ EN USSR

Kiel jam en la lasta L.P. raportis k-do Tell el Leningrado ni sukcesplene organizis prelegon de k-do prof. Bokarev en la Societo por disvastigo de politikaj kaj sciencaj scioj. La temo estis: "Nuntempa stato de la problemo de internacia lingvo Esperanto". Pri ĝi ni publikigis anoncon en grava leningrada ĵurnalo "LENINGRADSKAJA PRAWDA", kiu sekvis ankoraŭ du brodkasoj. La salono kun 200 sidlokoj estis pli ol plerna venis ĉ. 300 personoj kaj multaj devis foriri nericevinte plu aĉeti enirbiletojn. Nun ni proponis al la societa estraro jenan planon: eldoni la lecion multekzemplere en presita formo. Krom tio eldoni broŝuron "La fundamento de Esperanto (teorio, gramatiko kaj vortareto), organizi Esperanto-sekcion kaj vicon da lekcionoj en fabrikoj, kluboj, lernejoj ktp. pri Esperanto. Mi opinias, ke en Ĉeĥoslovakio kaj aliaj Popoldemokratioj ekzistas samspecaj Societoj. Se jes, estus bonege organizi peresperantan kontakton kun nia Societo.

La Leningrada Instituto por perfektigo de instruistoj montras intereson al Esperanto kaj volonte organizus korespondadon inter leningrada instruistaro kaj instruistoj de Popoldemokratioj ĝi estus grava paŝo por enpenetri kun Esperanto en la lernejojn. Kion vi opinias tiurilate?

Prof. S. Podkaminer  
LENINGRADO

### NIA PORPACA MOVADO KAJ LABORO EN MIKULOV

Nia distrikta komitato de pacdefendantoj en Mikulov laboras sindoneme por la granda kaj vere tuthomara ideo de mondpaco. Ni klopodas tiamaniere:

1./kunvenojn vizitadas ĉiuj anoj kaj membroj de la komitato regule kaj laŭplane. 2./en ĉiu kunveno ni donas ĝeneralan bildon pri la internacia situacio de nia movado 3./aparte ankoraŭ analizas la porpacajn taskojn. La prelegojn pri la internacia situacio

kaj analizadon de niaj porpacaj taskoj faras ĉiu komitatano laŭplane kaj sinsekve. Per tiuj prelegoj k. diskutoj ni ĉiuj gajnas instruon kaj scion pri gravaj taskoj kaj spertojn la batalo por la paco. Sed tiajn tiajn erudiciojn ni ne konservas nur en nia kunvena ĉambro, ni disvastigas tiujn instruojn ĉiuokaze en kunvenoj de kamparanoj, de Ruĝa Kruco, de fabrikoj, en lernejoj ktp. 4./ni jam posedas bibliotekon de libroj kun pactendencaj temoj, pli ol 100, kaj en kunvenoj ili estas dispruntataj inter la membroj por meminstruado. 5./ ni laboras pere de 10-minutaj relacioj en la radiodisaŭdigo de nia urbo Mikulov kaj la ĉirkaŭaj vilaĝoj de ties distrikto. La tekstojn por tiuj relacioj ni preparas en niaj kunvenoj, kiuj estas po 14 tagoj. Kunvenoj ankaŭ aprobas ilin. En niaj kunvenoj ni ankaŭ verkas 5-10 liniajn raportetojn, kiujn publikigas la loka distrikta gazeto "KOLEM PALAVY". 7./ Ni organizas kaj instruas junularon kolekti kun pacmotivoj kaj fondos grupon de filatelistoj-pacamantoj. 8./ en oficejo de la Ligo de amikoj de Sovjetio ni havas propran fenestron, en kiu ni ekspozicias gazetojn, korespondaĵojn, poŝtmarkojn, fotojn ktp. Multaj preterpasantoj haligas antaŭ tiu fenestro kaj ofte longe studas ĝian interesan enhavon.

En la postsomeraj monatoj ni intencas aranĝi en la loka kulturdomo porpacan ekspozicion. Neniam ni forgesas en ĉiuj kunvenoj de mikulovaj pacdefendantoj (naciaj) informi la ĉeestantojn pri la progresoj de Esperanto en la internacia pacmovado, precipe en USSR, montras niajn gazetojn "PACO" kaj "LA PACDEFENDANTO"n kaj pritraktas ilian enhavon. Ni klopodas per nia granda esp-ista pacideo enpenetri en ĉiun domon – en ĉiun vilaĝon, informi kaj instruadi la loĝantaron de nia regiono pri la neceso de senhalta batalo por sekurigi al la homaro la mondpacon.

Anoj de aliaj distriktoj kaj regionoj, bonvolu al ni komuniki viajn spertojn. Via laboro por la paco kreskigu kaj forigu la pacon en nia kara hejmlando.

Alfredo MACEK  
kanoniko,  
membro de la estraro de la  
Komitato por Pacdefendantoj  
en MIKULOV, Morava, Ĉeĥoslov.

## ŜIRMADO KONTRAŬ ATOMARMILOJ

/Kontribuaĵo al artikolo de MUDr. V. ŘEFKA el n-o 52-55a/

La artikolo de MUDr. V. Řepka provizis la legantojn per multaj utilaj informoj. La intenco de la aŭtoro estis mildigi la inklinton al paniko, kiun kaŭzas ofte la asertoj de militinstigantoj. Vere, en kelkaj ŝtatoj, precipe en Usono, estas tendencoj timigi la mondon per minaco kun ekstermigaj armiloj, kiuj kapablas ekstermi vastajn terenojn inkluzive grandurbojn. Vera pacamanto ne povas aŭdi tion sen abomeno. Sed la militaviduloj forgesas, ke ankaŭ la stimulado al paniko kaj fortimigado per la efikoj de la bomboj povas esti dutranĉa armilo kaj povas al la inicianto malutili eĉ pli, ĉar lia popolo, konstante ekscitata, en mala kazo mem povas suferi pro la paniko. Nun ankaŭ Sovjetio posedas la aĉajn armilojn kaj estas nekontestebla fakto, ke en regionoj kun densa loĝantaro la uzo de la bomboj ege povus panikigi ĵus Usonanojn. Ankaŭ veraj pacistoj iam troigas la faktajn okazaĵojn. Sed ĉu oni vere troigas la danĝeron?



La aŭtoro ne menciis la fakton, ke la armiloj daŭre evoluas kaj ke jam en nuna tempo la plej efikaj ne estas kompareblaj kun tiuj, kiuj detruis la urbojn Hiroŝima kaj Nagasaki. Ie mi aŭdis, ke la unuaj atombomboj estas kompare kun la nunaj "ridinde" malmulte efikaj. Kia terura stato de homa menso! Kio povas esti ridinda en intenco, detale preparita masakro de miloj da homoj? Kaj la evoluo daŭras ...

Ĉu povas ekzisti flanke staranta homo rilate al paco kaj milito? Ĉiu devas formi sian opinion en tiu afero. Ne ĉiam la homo sukcesas pripensi la danĝeron ĝisfunde. Ekzistas ankaŭ voĉoj, kiuj per trankvila, sinkontentiga tono nur kalkule pritraktas la temon. Tia sinteno de nur konstata pozo ne estas signo de funda pripenso kaj ne taŭgas por pacdefendanto.

Sed kvankam la abomeno kontraŭ la vanta hombuĉado ĉiam pli proksimen kunligas la homojn, tamen, ilia elirpunkto kaj ilia ideo pri la solvo de la problemo ne ĉiam harmonias. Ekzistas pacifistoj, kiuj preferas oferi eĉ sian vivon kaj aliflanke estas konvinkitaj pacdefendantoj, kiuj ne hezitas per armiloj batali por siaj ideoj. Ili nomas siajn ideojn ankaŭ pacajn kaj kunligas ilin kun sia patrujamo, socialisma konvinko aŭ simile.

La rapida fluo de la evoluo en intergentaj rilatoj en la nuna mondo devigas eĉ profundajn pensulojn rapide orientiĝadi en konstanta torento de novaj influoj kaj pensoj, kiuj vibrigas la malnoviĝintajn, iam en sia nacia sfero hermetike enfermitajn pensmanierojn. La ideo, kiu konstante potenciĝas per sia ĉiam pli intensa rondflugado ĉirkaŭ la terglobo – estas la ideo de la paco. Sed ni ĉiuj estas tiom enradikiĝintaj en niajn malnovajn pensmanierojn, ke ni eĉ nefacile povas rimarki niajn proprajn mankojn el la tempo de triumfanta naciismo, kiu ĝenerale estis tre malproksima de la mondopaca ideo. Kaj nun la ideo kristaliĝas kaj ni staras antaŭ la problemo, ke ni ne povas ĉiujn ĝiajn sekvojn facile kaj glate ensorbi kaj ofte subkonscie agas kontraŭ niaj plej bonaj intencoj.

Ni elektu unu ekzemplon el nia ĉiutaga frazaro: la aŭtoro diras, ke "la fortoj, kiuj malhelpas la batalon por la paco, devas esti el la mondo forbalitaj". Se temas pri fortoj, kiuj trapenetas niajn cerbon kaj menson, estas bone. Sed kiamaniere? La aŭtoro ne solvas la problemon. Ĉu li fidus je paca solvo de la mondaj problemoj? Ĉu li kredas, ke la paca kunlaboro de la tuta mondo levos la homaron al pli alta morala koncepto kaj ke ĝi fine kun malestime komplete kaj por eterne forturniĝos de ĉiuj armiloj, aŭ, ĉu li per forbalaado intencas timigi tiujn, kiuj ne estas en nia tendaro? Estas ja vero, ke ekzistas multaj porpacaj fortoj kaj individuoj, kiuj ne enviciĝas en la t.n. "pacan tendaron", tio estas, ne identiĝas kun nia batalmetodo, kaj kiuj tamen havas progresemajn ideojn kaj sincere klopodas sendepende efektiviĝadi siajn pacajn ideojn kaj sopiras vivi en paco.

Mi neniel provas riproĉi al la aŭtoro lian konvinkon pri la fido al la paca tendaro. Sed pardonu, ke mi ne estas certa pri la monoliteco de la paca tendaro. Per tiaj diroj ni povas florlogi de ni nur la honestajn, aparte starantajn pacanantojn. Kaj ilia helpo ĵus povas efike akceli la venkon de la paco. Nuntempe oni parolas multe pri la kulto de individuo. Ĝi estas nenio alia, ol perfortiado de tiuj, kiuj malsamopiniis. Sed ne en monolita, male en aglutina karaktero venkos la paca movado. Ni ne heroldu pri la forto de nia pactandaro kaj pri nia batalo por venko de socialismo, sed prononu al kunlaboro nian manon al tiuj, kiuj flankestaras kaj ankoraŭ ne fidus al ni

plene!

Ni konvinkigu tiujn, kiuj nin supektas, ke nia p a c o ne kontraŭas ilian pacstrebado. Dependas de ni fari la unuan paŝon! Temas precipe pri diversaj religiaj, pacifistaj, humanaj movadoj kaj rondoj. Ni montru nian toleremon kaj volon al kunvivo kaj la venko estos nia!

Karek KRAFT  
Obořiště 100 u Dobříše, ĈSR.

### S O V J E T – A R M E N I O V A S T E T P A P E N E T R A T A D E E S P E R A N T O .

- La agado de kelkaj sindonemaj malnovaj esperantistoj en ni ĉefurbo Erevan, la funkciado de kelkaj Esp-kursoj kaj la propagando de nia lingvo inter studentoj kaj gejunuloj certe donis sian rezulton. La esperantistoj de Erevan ricevis de la sekretario de la Centra Komitato de Armenia Komunisto Partio la permeson, organizi tutlandan konferencon de armenaj esperantistoj, elekti estraron de organiza komitato, eldoni gazeton en unu el la kluboj por siaj kunsidoj, konferencoj, ekspozicioj k.a. aranĝoj.

La armenaj esp-istoj esprimas sian profundan dankon al la C.K. de la Armenia Komunista Partio, kiu, kiel ĉiam kontribuas al ĉiuj kulturaj entreprenoj, kiuj aperas en nia lando kaj celas plialtigi la kulturan nivelon de nia popolo.

En la gazeto "GRAKAN TERT" ("Literatura Gazeto"), organo de la Asocio de Sovjet-armeniaj verkistoj aperis la 9an de majo granda artikolo sub la titolo "NOVA ARMILO EN LA LUKTO POR LA PACO" de sperta Journalisto, k-do. S. Martirosjan, kie la aŭtoro donas faktojn pri la Esperanto-movado en Erevan kaj parolas pri la signifo de internacia lingvo por la interpopolaj kontaktoj, kulturaj interŝanĝoj kaj disvastigo de la pac-ideo.

En komenco de sia artikolo kdo S. Martirosjan rakontas pri la ampleksa korespondado en Esperanto de erevanaj esp-istoj kun samideanoj kaj organizoj de preskaŭ tuta mondo; li kalkulas inter aliaj la redakcion "La Infanoj de la Mondo" en Japanio, la Asocion de Esperantistoj en Polio, laboriston Willy Böhn en DDR, pref. Mil. Lukáš en ĈSR, Bertil Englund en Svedio ktp. La aŭtoro parolas pri la pacmovado, kiu ekregis la tutan progreseman homaron, pri M.E.M. kun oficiala organo "PACO" kaj ĉeĥoslovaka organo "LA PACDEFENDANTO".

Priparolante la fakton, ke Esperanton oni devige aŭ fakultative instruas en multaj lernejoj de Eŭropo, k-do S. Martirosjan aldonas:

"En tiuj lokoj ĉie funkcias kluboj, rondetoj, asocioj, kiuj kunigas la fortojn de la esperantistoj.

Ekzistas bonegaj tradukoj en Esperanto de verkoj de tiaj klasikaj aŭtoroj ĉe literaturo, kiel Tolstoj, Gorki, Ĉeĥov, Ŝekspir, Gëthe, Heine, Gogol, Mickiewicz, Beiron, Turĝenev, Mopasan kaj aliaj. Ne estas malfacile kompreni, kian grandegan signifon havas la studo kaj larĝa disvastigado de tiu fleksebla, tre facila lingvo, kiu estas potenca ilo por kontakto inter Japano kaj Armeno, Aŭstrianio kaj Svedo, Vietnamano kaj Ruso kaj inter ĉiuj ceteraj popoloj de la mondo."

La artikolon li finas per jenaj vortoj:

"Iom post iom pli densiĝas la vicoj de esperantistoj. La unua fajrujo de Esp-o estas kreita ankaŭ ĉe ni en Erevano. Tiun laboron gvidas entuziasmaj esperantistoj

Simon Mkrtiĉjan kaj lingvisto prof-o Gurgen Sevak. Ju pli vigliĝos la esp-korespondado inter niaj civitanoj kun niaj eksterlandaj amikoj, des pli firmiĝos ilia reciproka interligo.

En la gazeto "AVANGARD", organo de Centra Komitato de Armenia Komunista Junularo, la 15an de majo aperis sur la titolpàĝo letero de nia granda poeto Avetik ISAHAKJAN sub la titolo "La parolo de Avetik Isahakjan en Esperanto" kaj poste:

"En la marta n-o. de =La Pacdefendanto=, esperantlingva organo de ĉeĥoslovakaj pacdefendantoj, estas publikigita la sekvanta letero de la eminenta armena poeto Avetik Isahakjan, adresita al la redaktoro de la sama gazeto kaj prezidanto de "Mondpaca Esperantista Movado" k-do Rudolf Burda:"

Sekvas la letero de A. Isahakjan kiu antaŭe estis publikita en la marta n-o. de "La Pacdefendanto".

S . MKRTIĈJAN  
EREVAN-Sovjet-Armenio

### GRAVA LITERATURA GAZETO DE Ĉ. S. R. SKRIBAS PRI AV. ISAHAKJAN

"KVĚTEN", monata revuo por literaturo kaj arto, prezentas al siaj legantoj amplekan informon pri la mondkonata eminenta armena verkisto kaj poeto A. Isahakjan en sia 9a numero. Ĝin sekvas 3 legendoj el verko de la poeto, tradukitaj de k-dino Ludmila MOTALOVÁ el Praha en ĉeĥan lingvon: "Enamiĝintoj", "Infaneco" kaj "En kio estas konsolo. Ili estas prezenataj kvazaŭ la unuaj hirundoj el libro, kiun preparas eldoni L. Motalov pere de eldonejo "SVĚT SOVĚTŭ".

### AVETIK ISAHAKJAN SERIOZE MALSANA

Jam pli ol du monatojn kuŝas nia amata poeto kaj sincera amiko de erevanaj esperantistoj serioze malsana. La kuracistoj ne permesas lin ellitiĝi, legi, skribi kaj multe paroli. Kompreneble ankaŭ ĉiuj vizitoj estas malpermesataj. En la nomo de nia redakcio kaj ĉiuj legantoj ni tutkore deziras, ke nia eminenta poeto kaj granda amiko A. Isahakjan kiel eble plej baldaŭ resaniĝu, por ke li povu per sia sindono ankoraŭ multajn jarojn kontribui al nia porpaca esperantista movado.

### MUNICIO POR NIA BATALO

	Kĉs:
K-do J. Doležel-Petrovice	4,-
K-dino Matuškova-Opava	4,-
K-do J. John-Ostroměř	4,-
K-dino P. Maroušová-Plzeň	5,-
K-do J. Kafka-Pernštejn	3,-
K-dino M. Rajnyšová-Praha	4,-
K-dino E. Domsová-Nový Bor	10,-
K-do A. Macek-Mikulov	10,-
K-do B. Štefek-Rybná n/Ĉ	10,-
K-do J. Volanský-Budňany	4,-
K-do J. Pátek-Holešov	2,-

K-do K. Svoboda-Mlýny	4,-
K-dino M. Rohlíková-Praha	4,-
Esp-rondeto-Plzeň	14,-
Esp-rondeto-Příbor	10,-
J. Mazurek-Gottwaldov	4,-
Esp-grupo-Žandov u Čes.Lípy por prunto de "Hirošima-filmo"	50,-
B. Háva-Liberec	4,-
K-do J.Dittrich-Medlov	4,-
K-do nenomata	10,-
K-do Zd. Řezáč-Svárov	4,-
K-do J. Lička-Bohatice	8,-
K-dino C. Vaňková-Svit	4,-
K-do J. Pomykacz-Třinec	4,-
K-do A. Zedník-Modřany	4,-
K-do V. Kučera-Plzeň	4,-
K-do J. Stankuš-Orlová	4,-
K-do V. Derevenec-Šála	4,-
K-do A. Váňa-Dudince	4,-
K-do " " paperon por	25,-
K-do pastro K. Švarc-Osek	4,-
K-dino A. Repková-Prievidza	4,-
K-do L. Pietrovski-Hulváky	9,-
K-do V. Saktor-Slov. Lupča	6,50
K-do R. Lipka-Karviná	4,-
K-dino Z. Jankuová-Bardejov	8,-

Al ĉiuj ni esprimas nian plej sinceran dankon. Estas grava helpo.

### KIU POVAS HELPI?

Dum somero aŭ aŭtuno, mia edzino kaj mi devos akompani nian infanon por ĥirurgia operacio al urbo L e i d e n. Ni petas oĝejon de ĉe samideanoj, ni posedas aŭtomobilon kaj kampo-litojn.

Adreso: Marc DELFORGE, profesoro, BOUILLON, Belgio.

### NI FUNEBRAS

En aprilo mortis fervora k-do Karel PŘEČEK, Dolní Bludovice 551. Li aktive laboris en la MEM-sekcio de la regiono Ostrava.

En majo mortis malnova kaj tre aktiva k-do Pavel TROMBÍK, Skřečůň č. 404, Bohumín-IV. Li kunlaboras ekde la komenco de nia Esp-pacmovado k. estis abonanto de ĉiuj niaj gazet.

Trankvilon al ilia eterna dormo deziras al ili ĉiuj esperantistoj.

## K O R E S P O N D I D E Z I R A S

---

K-do Willy SIELER, 153, Murray str. BINGHAMTON N-Y, U.S.A. kun sovetaĵoj gesanoj pri ĉiuj temoj.

K-do Yosiharu SINDO, Mie-ken, Owase-si, Miya-no-u-e. Japanio, interŝanĝas il.p.k.kun ĉ.landoj, speciale kun Popoldemokratioj k. Sovjetio.

GEWERBLICHE BERUFSSCHULE, Str. des Friedens, RADEBEUL-I, Germanio DDR, (profesia lernejo) kun samaj el ĉiuj landoj por interŝ. instruplanojn kaj metodojn, infandeseĝojn k manfarit. objektojn de lernantoj. La korespondado okazas ambaŭflanke en nacia lingvo plus Esp-traduko.

K-do Andreev Viktor, Bolŝaja Sadovaja ulica dom 8 kv. 2, MOSKVA-K-1, Sovjet-Unio, pri fotografado kaj interŝ. amator-fotaĵojn kun ĉ. land.

K-do K. ZWIERS, Middenstraat 37, SLIEDRECHT, Nederlando, interŝanĝas po 50-100 p.m. (uzit. aŭ neuzitajn.)

K-dino Galja PĈELINCEVA, Sirotskij poreulok, dom 17, kv. 20, MOSKVO V-162, Sovjet-Unio, per ilp.k.kun ĉ. 1.

K-do Ervin MOZERT, Padomju bulvard RIGA, Latvijas P.S.R. (stud. de filologio) dez.kor. kaj interŝ. literaturon kaj il.p.k. kun lingvistoj kaj aliaj el la tuta mondo. Komprenas anglan, germ., rusan kaj iom francan lingvojn. Respondo garantiita.

Gestudentoj de Pedagogia Instituto en RIGA, Latvio, deziras koresp.

K-do Alberts GRIVANS (stud. de angla lingvo)

K-do Elmars VENTERZUTIS (stud. angl.)

K-dino Halina MUNDECIÉMA "

K-dino Venéranda ZEIVENIECE "

K-dino Valentina OSNE "

K-dino Aina SKUJA "

K-dino Valda TREILIBA "

K-dino Astrida SKALDERE "

K-dino Aina GLEKNERE (stud. germ.)

K-dino Zinaida AUDZINA "

K-dino Lija KRAMINA "

K-dino Anna CIMARE "

K-dino Brigita BERZINA "

K-dino Dagmara FELDMANE "

K-dino Irena MALDONE "

Komuna adreso por ĉiuj estas: Rigas Pedagogiskaís instituts – Poŝtkesto "ESPERANTO" Gorkija iela No. 48, RIGA, Latvijas PSR, Sovjetio

K-do Stojko DIMITROV (instruisto mahala Volĉevska, TROJAN, Bulgarip pri ĉ. temoj per let.il.pk.interŝanĝas Esp-gaz. revuojn, fot. ktp.

K-do A. BRAUER, Studienrat, Dr. K. Fischer Allee 31, DRESDEN, Germ. DDR kun ĉiuj landoj.

K-do Josef KAISER, Hradiště č. 28, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio, per leteroj kaj il.p.k.kun ĉiuj landoj.

K-do Jozef LACKO, Okresní stavební podnik, ŠAHY, Slov. Ĉeĥoslovakio, pri novepokaj konstrumaterioj kaj konstruaĵo, precipe kun okc. landoj.

K-do Th. Müller, Louis Couperunsstr. 3/II., UTRECHT, Nederlando, kun ĉ.1.

K-do Vagó IMRÉ, instruisto, Rudas Lászlo-utca 21, PÉCS, Hungario, dez. ricevi infandesejnojn kaj pentraĵojn por ekspozicio en lernejo, kie oni rifuzis instrui Esp-on.

K-dino Ljuba NIKITINA, Postew rest. MOSKVA-9, Sovjet-Unio, pri ĉ. temoj kun ĉiuj landoj. Interŝ.il.p.k.

K-dino Valerija PANFILOVA, Malaja BRONNAJA, dom. 19, kv. 1, MOSKVA, USSR, per il. p.k.kun ĉiuj landoj.

Sekvantaj gestudentoj el Pedagogia Instituto de RIGA dez. koresp. kun la tuta mondo:

K-dino Lidija KAUGARE	(stud. germ.)
K-dino Ausma VERSE	"
K-do Viktors BĚRZINŠ	(stud. latvan)
K-dino Sofija DANILAKE	"
K-dino Maija GRINTŠTEINE	"
K-dino Albertine SAKNE	"
K-do Valdis STALIDZANS	(stud. biolog)
K-dino Emilija PIPARE	"
K-dino Benita TONNE	"
K-do Haralds KAUSS	(stud. matematik.)
K-do Ivans RAMANOVICS	"

Rigas Pedagogiskais instituts, Poŝtkesto "ESPERANTO", Gorkija iela No 46, RIGA, Latvijas PSR, Sovjetio

#### VIZITU LA KONGRESON DE BULGARAJ ESPERANTISTOJ

la 1-3an de julio en ĉefurbo SOFIO. Ni sendis jam personajn invitojn al kelkdekoj da aktivuloj en ĈSR. Aliaj interesuloj petu tuj detalan informon ĉe Bulg. Esperanto-Asocio, Bulvard Stalin 40, SOFIA, Bulgario.

-----  
Eldonis: Okresní výbor Obránců Míru – odbor esperantistů – MIKULOV.  
Redaktis: K-do Rudolf BURDA, Palackého nám. 6, P L Z E Ň, Ĉeĥoslovakio.  
-----